



6(112)  
2009

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO  
Adreso por korespondi: ul. I.Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków

Raymond Schwartz (1894-1973)

## Esperantisto, ekesto kaj malapero

Gazetartikolo  
Aŭ varba parolo.  
Favora impresio,  
Ekintereso  
Lernolibro,  
Sankta vibro,  
Propaganda miasmo:  
Entuziasmo!  
Samideano,  
(Je via sano!)  
Kamarado,  
Varbado,  
Instruo,  
En butontruo  
Verda flago,  
Gloro tago!  
Plua ŝtupo  
Nova grupo.  
Nova sento  
Facila vento  
Kaj poemo  
Pri sama temo!  
Post hezito  
Delegito.  
Laŭ bezono  
Gazetabono,  
Kotizoj  
Kaj valizoj  
Por kongreso.  
Miraklimpreso!  
Fraka vesto,  
Bala festo  
Naci – kostumo  
Amindumo.  
Hispanino,  
Korinklino

Kaj esperoj  
Amleteroj,  
Mielo,  
Ĉielo  
.....  
Edzino:  
FINO!!

**Raymond Schwartz** (1894-1973) franco, bankdirektoro; versaĵoj en multaj Esperantaj gazetoj; redaktoro de la fama spritgazeto "La Pirato"; fondinto de Esperantaj kabaredoj "La Verda Kato" kaj "Tri Koboldoj". Verkoj i.a: "Verdkata testamento" (1926), "Prozo ridetanta" (1928), "La stranga butikoj"(1931) "La ĝoja podio"(1949), "Vole...novele"(1971) "Kun siaspeca spico"(1971).

## La diversaj aĝoj de l'homo

En supra ĉambro, lulo...lulo...

Anĝele dormas la etulo:

Etaĝo.

Jam ne plu side li tamburas

Sed tra la dom' explore kuras:

Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)

Revenas el stratbubaj bandoj:

Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo

Knabinon ĉien sur la vojo:

Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon

Por fondi kune novan domon:

Domaĝo

Li tiam estas tre utila

Fortika viro, kvankam vila:

Vilaĝo

Kaj post rapida tempopaso

Postrestas nun senviva maso:

Masaĝo

PS. Ni ne apliku al virino

Ĉi tiun viv- kaj rimo- saĝon,

Ĉar de l'komenco ĝis la fino

Ŝi ĉiam havas saman aĝon:

Avantaĝo

# Krakova Societo Esperanto

## La programo de la renkontoj junie

03.06	Lidia Ligeza:	Serĉado de la malsolena esperanta lingvaĵo
10.06	Jadwiga Dzięgielewska:	Pri la esperanta kanzono
17.06	Stanisława Szostak:	Kasteloj kaj aliaj allogaĵoj de Germanio
24.06		Antaŭlibertempa societa renkonto

### Pri serĉado de la populara, esperanta lingvaĵo

Plej ofte aplikata difino de nocio LINGVO estas dispartigita je tri rimedoj, laŭ kiuj oni scipovas komunikiĝi. **A** - Sistemo de vortoj, uzata de unu gento, unu nacio aŭ unu grupo de nacioj, por interkompreniĝo; **B** - Sistemo rigardata kiel karakterizaĵo de speciala grupo da individuoj aŭ de aparta fako: lingvo scienca, teknika, biblia, popola, lingvo de metiistoj, ŝtelistoj, studentoj ktp. **C** - Ĉio, kio servas por esprimi pensojn aŭ sentojn; lingvo de gestoj, rigardoj, lingvo de bestoj, de floroj. Ĉi momente la plej interesas nin grupo **B**, kiu ampleksas ankoraŭ nociojn; ĵargono (lingvo malmodela), slango (lingvo de forte apartigita grupo), dialekto (lingvo de popolo en difinita, geografia loko).

Homgrupo, kiu longe restadas kune povas krei propran sublingvon - lingvon popularan, kiu estas aperaĵo rilatanta antaŭ ĉio al la socia vivo. Slangoj de lernantoj, paŝtistoj, ŝtelistoj, do lingvoj de forte apartigitaj komunumoj diferencigas de la lingvo oficiala, substrekas sendependon de la rekomendataj vortaroj, do la liberon de la parolanto. Tia lingvaĵo aperas, funkcias dum iu tempo, ne restas en la slango por ĉiam. Priservinte mallongdaŭran bezonon ĝi mortas, cedante lokon al pli novaj eltrovaĵoj. Dum 50 jaroj juna, atrakcia knabino laŭvice estis nomata "babka", poste "cizia", kaj nun ŝi estas "laska" aŭ tute malelegante "towar". Malnovaj romanoj konservis nomojn por tia junulino "sikora" aŭ "dzierlatka". Aplikataj estas unuopaj vortoj aŭ tutaj malmodelaj frazoj.

La esperanta komunumo ne tiom forte bezonas popularan lingvon, kiom studentoj aŭ fakuloj, sed estas momentoj, kiam nui diligente serĉas ion, kio estus malpli solena ol kongresaj paroladoj, kio bone imitus lingvon de la strato. Tiun bezonon sentas babilulo, sed antaŭ ĉio literaturisto kaj tradukanto, kiu devas serĉi ekvivalenton por malmodela teksto en nacia lingvo. Esperanto havas multe da avantaĝoj kaj unu bazan mankon - la sisteman maleblecon formi lingvojn popularan kaj arkaikan. Ne okupiĝante nun pri arkaismoj, ni notu bezonon imiti en Esperanto malmodelan, popularan lingvaĵon. Nature Esperantujo tiajn parolturnojn verŝajne ne povas havi, ĉar esperantistoj rare pli longe vivas komune sur unu loko, kio estas baza kondiĉo por tiun lingvaĵon prilabori. Do kiamaniere imiti esperantlingve, se necesas, ecojn de parolo de infano, simplulo, homo neglektanta lingvajn principojn, kamparano? La vivo mem rare povas al ni iom suflori. Dum internacia tendaro en Hungario germanoj enkondukis terminon "polinumi" t.e. rendevui kun polinoj. Poste jam "polinumis" la tuta tendaro. Plejparte oni devas barakti inter vortaroj kaj turmentiĝi sole. La rezulto ne estas impona. Ĉiam oni rajtas transdoni nur la sencon, kio memkompreneble forigas de la teksto buntecon de originalo. De tia finsolvo oni povas ne esti kontenta. Ekzemple en "La petskribo" de Sławomir Mrożek frazon "ale teraz przyszedłem na swoje, to mogę poprowadzić" mi tradukis "mi nun atingis ĝustan prijuĝon, do mi povas gvidi".

Ekzistas vortoj bone priskribantaj simplajn, ĉiutagajn situaciojn, sed ili povas inciti pro la troa longeco. Kvankam ili estas "pretaj" - la literaturistoj ilin evitas. Ekzemploj: birdostangeto (grzędą), kvazaŭblindigi (oślepnąć), sendolorigilo (środek usmierzający), bonodorfumaĵo = incenso (kadzidło), arbargardisto (gajowy), fajrestingistaro = fajrobrigado (straż pożarna), balaaĵsovelilo (śmietniczka)...

Ankaŭ oni evitas "pure zamenhofajn" vortojn aŭ parolturnojn pro ne entute klara, neununura senco: "rompi al si la kapon" (łamać sobie głowę) povas esti komprenita kiel "vundi la kapon", kio en vortaroj ankaŭ signifas "rompi la kapon"... Kaj ankoraŭ: kampobotelo (manierka), akvokondukilo (wodociąg), randodentoj (zębki na znaczku pocztowym), kamenobreto (półka nad kominkiem), brakinfano (dziecko na rękę), evitigi ion al iu (oszczędzać komuś czegoś), fari edziĝopeton (oświadczyć się), meti sin tro alte (zbyttnio się wynosić).

Al sukcesaj lingvopropoj pli popularigi esperantan lingvaĵon apartenas :

1. vortoj devenantaj de la naciaj lingvoj : ĉardo - hungara drinkejo, samovaro - rusa ujo por prepari teon, kimono - japana vesto, tango - argentina danco, dolaro - usona mono, skupĉino - sudslavia parlamento.
2. kunmetaĵoj ampleksantaj sciencajn aŭ pseŭdosciencajn nociojn: segfiŝo (ryba piła), silikraŭpo = bombiko (jedwabnik), majfloro = konvalo (konwalia), rempiedaj birdoj = palmipedoj (ptaki wiosłonogie).
3. simplaj aŭ kunmetitaj vortoj kaj frazoj aplikataj metafore; kolombumi = rukuli (gruchać; ankaŭ pri homoj), serpentumi (wić się jak wąż), trosali (przesolić), nudpiede (boso), nudkape (z gołą głową), sinofero (samopoświęcenie), rikolti laŭrojn (zbierać laury), streĉi orelojn (nadstawić uszu), la sorto ridas al li, sen ombro da dubo.

Individuan provon krei lingvon de la junulara medio faris granda vorto-majstro Kolomano Kalocsay. En traduko de rakonto de Emil Kolozsvári Grandpierre "Geedziĝo laŭ hodiaŭa maniero" li proponis jenajn interesajn parolturnojn: "mi furaĝis min" anstataŭ "mi manĝis" (furaĝo - pasza), "en ega saŭco mi sidas" (mi havas embarason), "klasa membro li estas" (li estas superba ulo), "ĉu via menso ferias?", "ĉu krakas via melono?" (ĉu via kapo laboras?), "ni alsuĉu la ĉampanon", "ranca trogloditejo" (stare mieszkanie; ranca - zjełczałe), "trankvi, trankvi, nenia pereo" (analoge al pola, pli kurta - spoko, anstataŭ spokojnie). Ankaŭ menciindaj estas pasiaj alvokoj: "heninde!" (heni-rzeć), "animale kretena!", "beste bela!", "brute bela!", "animale!".

Elstara poeto William Auld kreis malmodelan lingvaĵon deformante fonetikon. En poemo "Ebrio" ĉi maniero ŝajnas entute fidinda, ĉar ebruloj povas fari tion en ĉiu lingvo:

la boteloj staras vice  
kamerade kaj komplice [ ...]  
palpebrume en la lumo  
min invitas al konsumo [ ...]  
... pri la griza ver' forgesi  
grila priva vorgeresi  
vira vorga pivaresi [ ...]  
dako danto danko dankon  
dankon  
padonu mineŝtaŝ bria  
padon' padon' 'kon 'kon

paŭzo naŭzo

Ĉu tiu manko de la populara lingvaĵo kiam ajn estos venkota? La Majstro kreis la lingvon, surbaze de tiu lingvo verkistoj kaj tradukantoj serĉas eblecojn sensolenigi kaj senoficialigi ĝin. La tasko nefacila, ĉar ankaŭ plaĉus al ni finsolvajoj respektantaj la bazan fundamenton kaj regulojn de gramatiko.

*Lidia Ligęza*

## **La nuntempa sakrala konstruado en Nowa Huta (2)**

Tre ofte gastis tie la kardinalo kaj celebris diservoj precipe dum Kristnasko kaj Pasko. Kiam mortis la paroĥestro Kurzeja, lia kadavro estis transportita al kriptoj de la finkonstruita en 1978-83 preĝejo. Arkitekto Józef Dutkiewicz projektis templon en formo de tri falditaj elementoj kun vertikala akcento - alta turo super enireja frontono. Tiu-ĉi objekto bone kongruas kun grandaj loĝejaj blokoj. Ĝi apartenas al la plej interesaj ekzemploj de la nuntempa sakrala arkitekturo.

Andrzej Ciechanowiecki, la arthistoriisto vivanta en Londono multe helpadis al konstruado de la preĝejo.

La skulptitan figuron de krucumita Jesuo Kristo kaj aliaj figuroj de sanktuloj realigis majstro Gustaw Zemła. Li estas ankaŭ aŭtoro de Sinjora Pasiono kaj baptisterio. La novkonstruita preĝejo portas nomon de sankta Maksimiliano Kolbe kaj estis konsekrita de la papo Johano Paŭlo la Dua. Antaŭ la preĝejo staras skulpturo bildigita la papon, verko de Gustaw Zemła, donaco de du makedoniaj civitanoj - R.Gustera kaj T.Kecman.

Ankaŭ ĉi-tempe en la teritorio de setlejo Wzgórza Krzeslawickie elkreskis la originala preĝejo nome de Dia Misericordio, kiun projektis Witold Çeckiewicz. En la aĵura ĉefa altaro estas enkomponita la mirakla bildo de Jesuo Kristo kun surskribo "Jesuo, mi fidas al Vi". La preĝejon konsekris kardinalo Franciszek Macharski en 1987.

Post la fino de t.n. "milita stato" en 1982 oni komencis konstrui sekvajn preĝejojn, ĉiujn kun elstare neripetebaj, originalaj formoj, ekzemple: la preĝejo al sankta fratulo Alberto sur setlejo Dywizjonu 303, la preĝejo al sankta Jozefo sur setlejo Kalinowe. En Bulwarowa strato fratuloj Pallotanoj konstruis preĝejon al la Dipatrino de Konsolo.

La grandan templon oni konstruis en setlejo Szklane Domy. Ĝi portas nomon de Ĉenstoĥova Dipatrino kaj estas filio de la malnova baziliko al Sankta Kruco en Mogiła. Projektis ĝin du arkitektoj: Krzysztof Dyja kaj Andrzej Nasfeter. Prezentiĝas ĉi tie modernaj preĝejoj en Nowa Huta altiras multe da ekskursanoj vizitantaj Krakovon, kiuj deziras sperti ankaŭ la plej novan sakralan arkitekturon, tiun de la fino de XX j.

*Alicja Sacha*

## **Trufo - plej multekosta manĝebla fungo de la mondo**

Nigraj, tuberaĵ, malbelaj kun intensa aromo de ioma putraĵo, kiu trapenetras ĉion krom vitro kaj lado. Por frandemuloj bonegaj. Tio estas trufoj, kiuj preze atingas jam kelk mil da eŭro por unu kilogramo. Ĉiam oni kredis, ke trufo havas magian forton. Eĉ nuntempe la "mondo de trufoj", malgraŭ, ke ĝi estas konata de super du mil jaroj, plu estas plena de sekretoj. Trufo apartenas al funga klaso de askomicetoj. Ĝi havas bulban formon kaj malglatan ŝelon. Pro kaŭzo de simila aspekto Francoj nomiĝas trufojn "la hunda nazo". Trufoj kreskas dekelk centimetroj sub tero, sur radikoj de trufa kverko, manĝebla kaŝtano, tilio, poplo aŭ avelujo, pro tio, ĉar ili ne kapablas produkti propran nutraĵon.

Trufojn estas tre malfacile trovi. En sezono de novembro ĝis marto ilin povas trovi per flaro. Al serĉado la plej bona estas porko kaj poste hundo. Bedaŭrinde, porko ankaŭ tre ŝatas trufojn kaj ofte malfacile estas forpreni fungon de ĝi. Spertaj serĉistoj trovas trufojn ankaŭ helpe de bastono. Kiam ili ektuŝos arbaran sterniĝon proksime de ĝusta arbo, kaj el sube de ĝi suprenflugos muŝo, tio signifas, ke tie povas troviĝi trufo. Plej ofte kolektistoj trovas trufojn ĉirkaŭ dek tagoj post pluvego. La tero devas esti varma kaj humida.

Serĉistoj ofte provas arte kultivi trufojn, sed pro manko de trufaj perikarpoj ili havas grandajn malfacilaĵojn en ilia plimultigado. En natura stato perikarpoj estas disportataj per aĵoj, kaj en Norda Ameriko per sciuroj.

Inter multaj specoj de trufoj la plej popularaj estas: itala blanka trufo, nigra trufo el Provenco, someraj aŭ vintraj trufoj el kroata Istrio kaj Hispanio. En Pollando ankaŭ okazis trovi trufojn en Bory Tucholskie kaj en ĉirkaŭaĵo de Częstochowa.

Odoro de trufoj estas tiel forta, ke oni uzas ilin ĉefe kiel spicaĵo al diversaj pladoj. Ekzemple, somera trufo el varmaj eŭropaj regionoj havas nuksan guston. Blanka trufo el Italio havas glicirizan guston. Nigra, vintra trufo de Provenco aŭ Italio havas aĵlan guston.

La plej bona metodo por konservado de trufoj estas enlokigi ilin en olivoleo. Dank'al tio olivoleo ricevos apetitigan aromon.

En Umbrio, la verda koro de Italio, kie troviĝas aŭtenta truffobaseno, sian sidejon havas la eŭropa reĝo de trufoj. En la itala urbo Adriatica Alba troviĝas muzeo dediĉita al trufoj. Ĉiujare en la franca Provenco sub patroneco kaj protekto de s-ta Antono okazas dankema trufa sankta meso.

Ĉar trufoj havas multe da frandemuloj, troviĝas de tempo al tempo ankaŭ trompitaĵ trufoj. Ili estas pli pezaj, ĉar interne estas plenigitaj per kugletoj de ŝroto, kio estas kompreneble punenda ago.

*Johana el Nigra Vilaĝo*